

## Mi/Ni volas subteni/kunhelpi dum la Civitana Renkonto en Kassel en la sekvaj kampoj:

- o Mi volas aktive kunlabori en la plangrupo. Regulaj kunvenoj ĉ. 2 fojojn ĉiumonate.
- o Mi povas dum la daŭro de la Civitana Renkonto disponigi privatan loĝejon por \_\_\_\_ personoj.
- o Mi povas helpi kiel interpretist(in)o. Lingvoj \_\_\_\_\_
- o Mi dum la Renkonto povas transprei helposervon (ekz. aliĝado, vetrurigo ktp.).
- o Mi donacos \_\_\_\_\_ € por la efektivigo de la Civitana Renkonto.
- o Mi volas ricevi pliajn informojn pri la Civitana Renkonto.
- o Mi volas partopreni en la Civitana Renkonto.

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Telefono: \_\_\_\_\_

Retadreso: \_\_\_\_\_

**Oficiala Kontakto:** Europa-Union Kassel e.V.  
Prof. Dr. Hermann K. Heussner (prezidanto), Breitscheidstr. 51, 34119 Kassel, Germanio  
**Telefono:** (0)561/18825, **Email:** kassel@eu-hessen.de  
**Retadreso:** [www.europa.union-kassel.de/buergerbegegnung-2018/](http://www.europa.union-kassel.de/buergerbegegnung-2018/)  
**Facebook:** [www.facebook.com/eukassel](http://www.facebook.com/eukassel)

**Esperanto-Kontakto:** Esperanto-Rondo-Kassel  
Wolfgang Guenther, Wilhelmshoehrer Weg 11, 34128 Kassel, Germanio, T. (0)561/92198202, Email: [w.guenther.esperanto@web.de](mailto:w.guenther.esperanto@web.de)

Europa-Union Kassel e.V. - 9/2018

# Unua Eŭropa Civitana Renkonto



**2018.Nov.15 ĝis 18  
en Kassel**

**Altaj protektantoj:**

**Christian Geselle, ĉefurbestro de la urbo Kassel**  
**Uwe Schmidt, ĉefadministranto de la distrikto Kassel**  
**Eva Kühne-Hormann, justicministrino de Hesio**



**Europa-Union**



## Karaj Geeŭropanoj,

la **Eŭropa-Unio Kassel reg. kaj Pulse of Europe Kassel** kune kun institucioj, asocioj, ligoj kaj engaĝiĝaj individuoj unuan fojon okazigos de la 15-a. ĝis la 18-a novembro 2018 (lundon ĝis dimanĉon) kvartagan

### Eŭropan Civitanan Renkonton en Kassel.

#### Pro kio?

Dum jardekoj la uniuĝinta Eŭropo alportis pacon kaj bonstaton al siaj enloĝantoj. Sed hodiaŭ la Eŭropa Unio alfrontas grandajn defiojn: la krizo pri ŝtataj ŝuldoj, la senlaboreco, klimatoŝanĝiĝo, migrado, diĝitigo, la breksito, populismo kaj multe pli. Por solvi ĉi problemojn Eŭropo bezonas pliprofundigitan integriĝon kaj multe da reciproka solidareco. La gecivitanoj de Eŭropo devas unuiĝi por konservi kaj pluevoluigi la unuecon de Eŭropo. Ĉar: *Unuiĝinta Eŭropo havos futuron nur kiel Eŭropo de siaj civitanoj kaj civitaninoj!*

#### Ĉu estas modelo por tia renkonto?

Gepolitikistoj, gecivitanoj el Germanio, Francio kaj Polio ekde 1991 politike tre intime kunlaboras formate de la t.n. „Triangulo de Weimar“. Multaj gravaj impulsoj ni ŝuldas al la kuraĝa iniciativo de la tiamaj ministroj pri eksteraj aferoj de la tri ŝtatoj. La „Triangulo“ pruvis, ke landoj kun tre diferenca historio povas sukcese formadi pacan Eŭropopn. Sed: *La „Weimara Triangulo“ povas realigi sian modelan funkcion nur, se laŭeble plej multe da gecivitanoj de ĉi EU-ŝtatoj renkontiĝas persone.*

#### Kion ni planas?

Ni planas Eŭropan Civitanan Renkonton, kiu okazu ĉiun duan jaron en Kassel.

Invitataj estas ĉiuj homoj el la EU-membroŝtatoj por ke

- ni pli bone interkonatiĝu
- ni povas renkontiĝi hom-al-home
- kaj ekas paroli unu kun la alia

Ni volas provi novajn vojojn de komunikado kaj interŝanĝo de travivaĵoj/spertoj.

Ne sufiĉas, se kunvenas la politiko, la ekonomio kunlaboras, la interkonatiĝo reduktiĝas al malmultaj grupoj, la “amasturismo” ŝajne klarigu al ni fremdajn landojn kaj kulturojn. Ne, Eŭropo devas kreski pli multe de sube ol ĝis nun. Homoj renkontu homojn – jen nia ideo pri la Eŭropa Civitana Renkonto. Ni estas konvinkataj: *Se ni EU-gecivitanoj interkonatiĝas pli bone, estiĝas konfido kaj la preteco al solidareco!*

#### Kiel ni interrenkontas?

Nia plano por la civitana renkonto intencas, ke ni renkontiĝos en (sub)grupoj, en plenkunsidoj kaj en komunaj aktivecoj.

**(Sub)grupoj:** La partoprenantoj kunvenas grupe kaj interŝanĝas pri aparta temo, ekz. Oldiĝi en Eŭropo, Eŭropa konscio pri historio, partoprenigo en Eŭropo, transnaciaj helpservoj (ekz. la Maltanoj), juraj problemoj, Pulse of Europe – manifestacii por Eŭropo, Homaj Rajtoj kaj jurŝtateco en la Eŭropa ekstera politiko, Eŭropa kulturo. Ĉiu grupo interkonsentiĝas pri projekto, kies rezulto estos fine prezentata. Laŭ tiuj konkretaj ekzemploj ni volas montri, kiujn avantaĝojn la Unuiĝo de Eropo alportas kaj kiel la Unuiĝinta Eŭropo povas esti pluevoluigata.

**Plenkunsidoj:** En la plenkunsidoj okazas la salutadoj kaj adiaŭoj, projektoj kaj rezultoj estas prezentataj.

**Aktivecoj:** Ni volas ne nur diskuti, sed komune konatiĝi kun la plej belaj flankoj de Kassel, interŝanĝi ideojn kaj festi.

#### Kie ni renkontiĝas kaj kie ni loĝas?

Loko de la renkonto estas Kassel. La konkretajn ejojn kaj lokojn de la renkontiĝoj estas konatigataj sufiĉe frue. Gepartoprenantoj eksterlandaj estas akceptataj en gastigaj familioj.

#### Kiel ni interkompreniĝas?

Lingvo ne devas esti barilo por partopreni en la renkonto. Ankaŭ tiu, kiu tute ne scipovas fremdajn lingvojn, estas kore invitata partopreni en nia renkonto. Ni certigos, ke dum ĉiuj renkontiĝoj ĉeestas lingvospertaj partoprenantoj respektive interpretistoj.